# TEA-BULTENO

2ª JARO | APRILO 1999 | NUMERO 4





## AGENDO




1 Ĵ
2 V Tradukvespero
3 S
**4 D**
**5 L**
6 M Ordigo de TEA-arkivo
7 M
8 Ĵ
9 V Sano kaj prevento per fitoterapio
10 S
**11 D**
12 L Progresiga kurso
13 M Ordigo de TEA-arkivo
14 M
15 Ĵ
16 V Esperantistaj gastoj en Triesto!
17 S
**18 D**
19 L Progresiga kurso
20 M Ordigo de TEA-arkivo
21 M
22 Ĵ
23 V El Esperanta gazetaro
24 S Malferma Tago ĉe UEA
**25 D**
26 L Progresiga kurso
27 M Ordigo de TEA-arkivo
28 M
29 Ĵ
30 V Ludkarta vespero - TRISEPO







## Ekologia sistemo por urba trafiko



*(El la triesta ĵurnalo* IL PICCOLO *- 25.02.99 - tradukis Elda Doerfler)*

Ene de la nuna jaro startos en Triesto la unuaj elektraj aŭtobusoj. La veturiloj, malbruemaj kaj malpoluciaj, trairos la urbon danke al specifa **S**istemo de **TR**ansporto **E**lektra je **A**ltirforto **M**agneta (**Stream**), projektita de *ANSALDO TRASPORTI*. Oni antaŭvidas inaŭguri jam en majo la unuan eksperimentan linion, laŭ unu el la plej trafikita, centrurba, vojo (*via Mazzini*).

Merkredon, la 24an de februaro, ĉeeste de la responsa administranto de la entrepreno ***ANSALDO TRASPORTI*** Luigi Roth, de la urbestro Riccardo Illy, de la regiona skabeno pri transportoj Valter Santarossa kaj de la prezidanto de la Entreprena Konsorcio pri urbaj Transportiloj (*ACT*) Giacomo Borruso, oni oficiale deklaris malfermitaj la muntad-laborojn por la unua «kanaleto», nomita *MAC* (modulilo je kondiĉita provizado). Oni difinis la starton de tiu eksperimentado «historia evento», ĉar iniciatita unuafoje en la tuta mondo.

Jen, popularscience klarigite, kiel pli-malpli tiu sistemo funkcias. Temas pri elektrizita unu-relo kiu servas por ŝargi, dum la surstrata cirkulado, la bateriojn instalitajn sur la veturiloj. Mallonge dirite, iaspeca trolea aŭtobuso, tamen sen bezono de aeraj kabloj.

Por la realigo de tiu eksperimenta, 5-kilometra, strato-parto, oni investis ĉ. 30 miliardojn da liroj, jam metitaj je dispono flanke de la regiono Friulo-Julvenetio kaj de la itala ministerio pri publikaj laboroj. Per tiu sumo haveblas ankaŭ novaj veturiloj: unu longa 12 metrojn kaj aliaj du, 18-metraj, pivot-busoj. La prezidanto de ***ACT*** estas plene konvinkita, ke temas pri elekto, longvida kaj monŝpariga, kiun estontece oni aplikos al aliaj aŭtobusaj linioj. Ĉi tiu pozitivaĵo, dum la realig-laboroj, certe pligigos la jam ĥaosan trafikeblecon de la urbo, sed oni certigis, ke, por eviti malkomfortaĵojn, oni laboros, ĉefe en la plej dense trairitaj vojoj, dimanĉe kaj dumnokte. La triesta urbestro substrekis, ke la sistemo *Stream* estas elpensaĵo de italo, kiu kunmetis diversajn, jam unuope elprovitajn, teknologiojn kun tre simpla sistemo, entute respektanta la medion. La responsa administranto de ***ANSALDO*** atentigis pri la rolo de Triesto, kiel avangarda urbo, cele al malpliigo de la kostoj por urba transportado kaj favore al protektado de la medio.

La teknikistoj de tiu entrepreno rimarkigis ke, kiam muntita la «unu-rela kanaleto», oni povos ĝin ekspluatadi ankaŭ por aliaj servoj, tio estas ekz. por la forporto de rubaĵoj, transdonado de poŝtaĵoj k.a. En Eŭropo la urbo Bordeaux, en Francio, estas anonconta konkurson

por renovigi la tutan transportan reton, kun la intenco adopti la sistemon *Stream*.

Tamen, Triesto - ĉi-foje - pioniras!

## Kiel funkcias la nova trafik-sistemo

### STREAM, SISTEMO JE MAGNETA ALTIR-FORTO.

*Stream* estas sistemo de magneta altir-forto elektre provizita, sur kiu irigi transportilojn, enhavantajn baterion, kiu sin ŝargas dum la veturado, ebligante tiel devojiĝojn ene de la koridoro, kiam estas bezonate superi barojn aŭ obstaklojn. Nuntempe, la kosto de la sistemo estas po 300-400 milionoj da liroj kilometre. Vito Siciliano (elp. Siĉiljano) nomiĝas unu el la inventintoj de tiu sistemo, ĝis nun elprovita nur en iu, alcele farita, spaco ene de la Fabriko *ANSALDO* en Napolo, sed ne en iu urba centro. «La ideon pri elektra transportilo kun pneŭmatikoj, nutrita pere de subtera kontakt-linio - *rakontas Siciliano* - mi ekhavis en la jaro 1995. Ekde tiam ni pristudis kaj pliperfektigis ĝin, ĝis la kreado de transporta sistemo kapabla nuligi ĉian formon de gasa kaj brua eligado».

En Triesto, dum la unuaj tagoj de majo, oni testos la novajn veturilojn dumnokte, por ne ĝeni la normalan trafikon. La ŝoforoj de *ACT* devos frekventi mallongdaŭran kurson, sed oni certigas, ke stiri aŭtobuson laŭ la sistemo *Stream* tute ne donas problemojn, plie ĝi estas ekipita eĉ per aŭtomata piloto.


Nun kelkaj detaloj pri la funkciado de la sistemo. Laŭlonge la «kanaleton» fluas elektra kurento inter 600-750 voltoj, kiu aktiviĝas nur kiam la tiel dirita *pick-up* (pikupo - ia speco de entirebla brako provizita per magneta «broso»), situanta sub la aŭtobuso, tuŝas la kontakto-linion. Alie ĝi restas komplete inerta. Tiu brako estas tiel farita ke ĝi retiriĝas, kiam estas ia baraĵo aŭ ĝi eliras el la kontakto-linio (ĉe ĉiu flanko estas marĝeno de 60 cm). Ĝi povas esti manregata ankaŭ de la ŝoforo mem. Tamen, se la aŭtobuso (aŭ ĉiu alia veturilo havanta tiun sistemon) perdas la kontakton, ĝi havas aŭtonomion de kelkaj centoj da metroj, ĝis rea kontakto, danke al baterioj, altrendimentaj kaj rapidŝargaj, je metal-kombino de nikel-jodidoj. Kaze de pluvo aŭ superakvo, estas antaŭvidita la muntado de du malgrandaj reloj el konduktiva materialo surflanke de la kaptad-surfaco, tiel ke nenio malhelpas la pluan funkciadon de la tuta sistemo.

La «kanaleto» – laŭ la asertoj de la teknikistoj de *ANSALDO* – konsistanta el du aluminiaj surfacoj (platoj longaj 48 centimetrojn kaj larĝaj 8), sur kies meza parto staras strio el izola materialo, tute ne modifas la normalan glatecon de la stratonivelo nek estas danĝera por motorcikloj kaze de abrupta bremsado sur malseka tereno. La maksimuma rapido de la aŭtobuso en la urbo estas po 70 kilometroj hore.

*La polucio de la urba atmosfero, pro la intensa kaj senhalta trafiko, kaŭzo de konstanta produktado de gasoj ellasitaj kaj de katalizaj kaj nekatalizaj veturilaj dampiloj, pro la hejt-centraloj industriaj kaj domaj, k.a., tiel efikis, ke la enurbaj vivkondiĉoj fariĝadas pli kaj pli neelteneblaj. Sed la komforton, disponigitan de la nuntempaj rimedoj por pli oportuna kaj facila ĉiutaga vivado, neniu intencas rezigni. Malgraŭ ke daŭre la amaskomunikiloj atentigas pri la malsanigaj konsekvencoj de medio malpura, tamen ĝis nun la diversaj administracioj (ĉu naciaj, ĉu regionaj aŭ lokaj), kies tasko estas ankaŭ aplikadi kaj observigi leĝaron, por kontraŭstari kaj redukti la danĝerajn efektojn de polucio, havas (aŭ pretekstas) malfacilaĵojn tion plenumi, unue ankaŭ kaŭze de la tro altaj kostoj por modifi la jam ekzistantajn, nelaŭleĝajn, instalaĵojn. Foje, eĉ se la tiucela kapitalo ekzistas, oni preferas doni la prioritaton al aliaj urboplanaj projektoj, subtaksante la gravecon de la problemo.*

*Tial ĉi tiu iniciato, ĵus komencita en Triesto, urbo en kiu, laŭŝajne, ekzistas pli da veturiloj ol da enloĝantoj, estas laŭdinda kaj subteninda kaj renkontas ĝeneralan aprobon de la triestanoj. Estas dezirinde, ke laŭ la tuta busa enurba reto estu muntita la sistemo Stream, kaj ke samtempe startu intensa propagandkampanjo favore al uzado de la publikaj veturiloj, kiun sekvos la fermo de la tuta centro al privataj aŭtomobiloj, por urbo kaj vivo pli viveblaj.*

*Nu, tiele loke. Kiam globe?*



## Denove pri Projekto EKA

En 1990 naskiĝis en Triesto la ideo konkrete realigi projekton pri enkonduko de Esperanto en la komercan kampon. EKA – Esperanto Komerca Agado celis fariĝi la perilo por krei tutmondan reton de komerc/ist-ant/oj.

Aktuale oni limiĝas atentigi pri la eblecoj de nia lingvo ekspluateblaj por simpligi la kontaktojn inter diverslingvanoj.

En Triesto mi eklaboris ĉe kooperativo de Norda Italio, kiu havas kunligojn kun pli ol 200 fabrikoj, pri la plej diversaj komercaĵoj (ĉefe mebloj, ĉiaspecaj ekipaĵoj por kuirejoj, banejoj ks, keramikaĵoj, kaheloj, fenestroj, pordoj ktp.) – entute ĉio por plena aranĝado de loĝejoj. Mi mem sukcesis kontribui al kreado de vendo-punktoj en Pollando por tiu kooperativo, kaj ĉio ĉi pere de Esperanto. Sekve de tiu sukceso nun mi estas taskigita peri kontaktojn kun aliaj esperantistoj-komercistoj por plilarĝigi ilian vendo-teritorion.

Kiu estas interesata kunlabori, povas kontakti min:
Grazia Nocent - Via Caprin 4 - IT-34137 Trieste
Retpoŝte: eliono@tin.it

## Ankoraŭfoje pri Eŭroparlamentanoj

En junio 1999 okazos eŭropa balotado por renovigi la eŭropan parlamenton. Endus, ke esperantistoj voĉdonu preferinde por EP-anoj, kiuj kuraĝe eniris la liston de EP-anoj, kiuj - diversgrade - opinias, ke Esperanto povus havi pozitivan rolon en eŭropa kontekst o.

Jen sugesto por realistaj aktivuloj: havigu al vi la plej freŝdatan liston kaj, vianome aŭ kolektive, nome de loka aŭ regiona E-grupo sendu fotokopion de tiu listo:

a) al tiuj, kiuj jam troviĝas sur ĝi por gratuli ilin,

b) al tiuj, kiuj ne enlistiĝis por bedaŭri tion.

Al ambaŭ substreku, ke tia listo gravas por fari la bonan elekton okaze de la eŭropa balotado.

Por pliaj informoj turnu vin al:
Germain Pirlot - Steenbakkerstraat 21
BE-8400 Oostende, Belgio

*(el RET-INFO)*

## PROKSIMAJ KAJ MALPROKSIMAJ RENDEVUOJ EN ESPERANTUJO

**$10^a$ Malferma Tago** ⇨ Sabaton la $24^{an}$ de aprilo, por la deka fojo, CENTRA OFICEJO feste kaj varm-kore akceptos vin en sia Roterdama nesto. Ekde la $10^a$ ĝis la $17^a$ horo eblos travagadi la tutan domon, esplorante la interesajn enhavaĵojn, ĉeesti prelegojn, debatojn, filmo-prezentojn ks, kaj – ne laste pro graveco – viziti la libroservon, kiu, laŭtradicie, ofertos siajn varojn je rabatitaj prezoj, eĉ pli ol 10-procente!

Speciala gasto estos la renoma verkistino Marjorie Boulton, kies ampleksa originala verkaro inkluzivas ĉiujn branĉojn de beletro. Ŝi estas ankaŭ populara pedagogo, kies ĉefverkoj tiukampe estas la progresiga legolibro «Faktoj kaj fantazioj» kaj la famaj Barlastonaj Esperanto-kursoj. Plie ŝi estas prezidantino de Rondo Kato, unu el la plej viglaj fakaj Esperanto-asocioj.

Antaŭ unu jaro, la $28^{an}$ de aprilo, dum la MF, oni omaĝis per prelego unu el la gravuloj de la 90-jara historio de UEA, nome ĝian fondinton Hector Hodler. Ĉi-foje eblos konatiĝi kun verkoj de lia patro, se oni alvojaĝos al Hago, en kies Komunuma Muzeo okazas ekspozicio de pentraĵoj de Ferdinand Hodler.

Atendas vin eĉ pliaj interesaĵoj: do, jam nun ekplanu viziton al Roterdamo kaj Hago - vi tute ne bedaŭros tion!!!

OSIEK

## Internacia Esperanto-Konferenco '99
## 17-23 julio 1999

Pasintjare IEK en Triesto, ĉi-jare en Metz, Francio. Se vi deziras resperti tiun ĝojigan familian kaj samtempe klerigan etoson, ĉeesti diskutvekajn prelegojn, debati kaj lerni, amikiĝi kaj kulture turismi en la koro de okcidenta Eŭropo, en 2000-jara romia urbo, kie ĉiuj epokoj kaj multaj popoloj lasis monumentojn, iru al Metz, kie OSIEK-stabanoj estas streĉe strebantaj por prepari neforgeseblan aranĝon.

Temo de IEK '99 estas: «**Mono kaj Civilizo**». Oni pritraktos la rilatojn inter la mono, jam plurjarmila kaj ĉiutaga ilo, kaj la homa vivo, societo kaj kulturo. Ĉu mono helpis/as aŭ malhelpas la civiliziĝon de la homaro? Kiel ĝi rolas socie kaj kulture? Certe vi emus debati pri tia demando, en epoko kiam mono okupas tiom da mensoj kaj laborkapabloj. Pluraj prelegontoj jam konfirmis sian partoprenon: Mantha Christou, Olga Kerzjuk, Edgar Müller, Yamasaki Seiko ka.

De la $17^a$ ĝis $23^a$ de julio 1999, vi konferencos en bela historia, 18-jarcenta, domo, apud branĉo de rivero Mozelo. Post la konferenco, okazos ekskursoj en lokoj gravaj por Eŭropo: Luksemburgo, Scy-Chazelles (hejmo de Robert Schumann), Strasburgo ktp.

Por tiuj kiuj deziros poste iri al la Berlina UK, oni jam antaŭvidas programon kaj malmultekostan loĝadon de la $24^a$ ĝis la $30^a$ de julio.

Eblas aliĝi eĉ interrete:
http://osiek.org/iek/metz99.html
Je via dispono por pliaj informoj, Bruno Masala:
bruno@poetic.com; http://osiek.org/bmasala
kaj TEA-sekretariino, ĉe kiu haveblas aliĝiloj.

## JUNULARO, TIO ESTAS APARTE POR VI!
## TEJO-SEMINARIO EN TORINO, ITALIO

Inter la $25^a$ de aprilo kaj $2^a$ de majo 1999 ĝi okazos en nordokcidenta regiono de Italio pri la temo


### LOKAJ KULTUROJ EN GLOBALA MONDO

La lastatempaj ŝanĝiĝoj en la politika, ekonomia, ekologia, kultura, scienca ktp terenoj de la homa vivo, ŝajnas krei iun novtipan unuecon de la mondo kiel «globala vilaĝo». Danke al novaj komunik-rimedoj (speciale la interreto) pli kaj pli fortiĝas la sento kaj konscio de homoj pri tutmondeco, kiu paligas la tradiciajn limojn inter nacioj kaj kulturoj.

Ni atendas precipe junajn Esperanto-parolantojn (ĝis 30 jaroj) loĝantajn en Eŭropo, kiuj ricevos repagon de 50% de siaj vojaĝkostoj. Entute estas 25 lokoj. Ni bonvenigas ankaŭ partoprenantojn de ekstereŭropo, sed nia buĝeto ne permesas al ili repagon. Tial la ekstereŭropaj aliĝantoj estas petataj aldoni detalajn planojn pri sia kontribuo al la programo kaj pri la financado de sia vojaĝo. Surbaze de tio eblos interkonsento pri eventuala financa kontribuo de TEJO.

Bonvolu sendi Vian aliĝilon kiel eble plej frue. Tuj poste estos dissendataj informoj pri (mal)konfirmo de via partopreno en la seminario. La seminarion subtenas Eŭropa Junulara Fondaĵo de la Konsilio de Eŭropo.

**Kontakt-adreso:**
Grigorij L. Arosjev
RU-117071 a/ja 31, Moskva, Rusio
rete: arosjev@usa.net



## Zamenhof-festo en Vieno

Sabaton la $17^{an}$ de aprilo, printempa memorkunveno bonvenigas ĉiujn geesperantistojn en la aŭstria ĉefurbo.

**PROGRAMO**

11.00 h. - Promeno en la studio de Aŭstria Radio Internacia, kun akompana gvidado de loka kunlaboranto. Eblas favorpreza tagmanĝo ĉe restoracio de ORF.
15.00 h. - Florkronado de la Zamenhof-monumento en la «Placo Esperanto».
16.00 h. - Memorkunveno en la Pola Instituto.
Sinanoncoj ĉe Katinjo Fetes Tösegi:
rete: roi.esperanto@orf.at; telefone: +43 676 5114170

## REKORDNOMBRA LERNANTARO EN HUNGARIO

En Debrecen ĉe la KLTE - Scienca Universitato LAJOS KOSSUTH - enskribiĝis, komence de februaro, por la baza Esperanto-kurso 125 gejunuloj. La kursestro estas Tibor Papp (i.a. redaktoro de la DEBRECENA BULTENO). La lecionaro finiĝos en junio per studfina ekzameno.
En Nyiregyhaza en du diversaj Altlernejoj aliaj gestudentoj sekvas kursojn pri nia lingvo 120-horajn, unua- kaj dua-gradajn. Vere promesoplena tuthungara instru-jaro!

**Plurajn informojn, aperintajn en ĉi-aprila numero de TEA-Bulteno, ni ŝuldas el RET-INFO.**

***El la itala magazino FOCUS n° 76 - februaro '99***

Jam preta universala lingvo.

Je la n-ro 72ª aperis artikolo pri artefaritaj plan-lingvoj. Mi ekhavis ideon: kial ne uzi la plej konatajn, ĉiulingvajn, vortojn? Ekzemple, la itala salutvorto *ciao* preskaŭ ĉie estas komprenata, samkiel la angla *love*. Sufiĉus serĉado de la plej kompreneblaj vortoj inter ĉiuj lingvoj parolataj en la mondo, kaj oni povos produkti universalan lingvon tuj uzeblan!

G.R. - Villavernia (Al)

*Ndr: Jen ia falsa Kolumba ovo! Tre verŝajne la skribinto, kiu ekpensis tiun brilan ideon, ĝis nun nenion legis pri Europanto, la elpensaĵo de Diego Marani.*

***El FOCUS n° 78 - aprilo '99***

*Respondo al la supre skribita propono, de alia leganto:*

Por elfari universalan lingvon, ne sufiĉas la vortoj! Sekve de la letero «Jam preta universala lingvo», mi deziras klarigi, kial ne eblas konstrui universalan lingvon laŭ la propono de la leganto G.R., nome per arigado de la plej konataj vortoj el ĉiu lingvo (*ciao, love,* ktp*)* en ununura terminaro. Kio diferencigas unu lingvon disde la aliaj, ne tiom rilatas al la vortaro kiom al ties gramatika kaj perifraza strukturoj, kiuj respegulas la «spiriton» de iu popolo. Kiu ne havis malfacilaĵojn lerni la diversajn metodojn per kiuj anglalingvano difinas la precizan okazmomenton de iu ago en pasinta, prezenca kaj futura tempoj? Kiamaniere germanlingvano povas rezigni pri la uzo de la futuro en la subjunktiva modo? El tio oni povas do, kompreni, kial tiaj provoj - **kia Esperanto** - fiaskis.


V. C. - Roma

*Pri la problemo de tutgloba interkompreniĝado ĉiam pli legeblas en revuoj, magazinoj, ĉiutag-ĵurnaloj ks: tio certe estas pozitivaĵo por tiuj kiuj jam solvis ĝin. Do, pli kaj pli ni havas okazon iel prezenti nian proponon: tamen informocele, elegante, klere kaj tute ne altrude.*

***En alia paĝo de FOCUS n° 78*** *- plia mencio pri Esperanto.*

**Interretaj poliglotoj -** Ĉu multon vi vojaĝas? Ĉu vi ŝatus peti informojn en zulua, gaela, afrikansa, bretona, aŭ **esperanta** lingvoj? Aŭ en aliaj pli disvastigataj idiomoj, kiaj la portugala, germana aŭ rusa? Senpage, en interreto vi povas lerni la rudimentojn de sesdek lingvoj (retadreso: www.travlang.com), helpe de surbendigoj kaj tuta frazaro pri ĉiutagaĵoj. En tiu ejo troviĝas ankaŭ la itala versio, kun serio da interligitaj vortaroj: eblas eĉ traduki de la latina en la hindan lingvon.

*



La 9ª de marto 1979 mortis en Den Haag (Nederlando) Andreo Cseh, unu el la grandaj figuroj de la Esperanto-movado. La rekta metodo, de li kreita antaŭ 70 jaroj, nun estas vaste konata tra la tuta mondo kaj agnoskata de la lingvaj institutoj kiel la plej trafa kaj moderna. Kálmán Kalocsay dediĉis al li la ĉi suban rimportreton:

Andreo Ĉe, la Gaja Stelo,
Migranta lingva apostol'.
Jen, malgraŭ sia pastra stol'
La ŝercojn ŝutas po sitelo.
La lingvojn kvazaŭ tra funelo
En kapojn verŝas dum petol'.
Andreo Ĉe, la Gaja Stelo,
Migranta lingva apostol'.

GRAVA!

# Likvido de Zamenhof-Lernejo en Bjalistoko

En RET-INFO aperis alvoko al ĉiulanda esperantistaro flanke de la instruistaro de tiu Lernejo, petanta amasan, viglan sed respekteman protest-reagon kontraŭ la decido de la urb-estraro malaperigi tiun institucion. Jen la teksto de la mesaĝo:

*«Al geesperantistoj de la tuta mondo!*

*Ni, instruistoj de Elementa Lernejo n° 23, je la nomo de Ludoviko Lazaro Zamenhof en lia naskiĝurbo Bjalistoko, ekzistanta de la 1959ª jaro, kiam – dum la Jubilea Universala Kongreso – okazis ĝia solena inaŭguro, en kiu partoprenis multaj esperantistoj el la tuta mondo, petas vin helpi savi nian lernejon.*

*Ni opinias, ke en la naskiĝurbo de la kreinto de la Internacia Lingvo Esperanto ne povas malaperi la sola lernejo portanta la nomon de tiu fama bjalistokano. Ne konvinkas nin la oficiala kialo, laŭ kiu ĝuste nia lernejo devas esti likvidita, nome reformado de la pola kleriga sistemo.*

*Laŭ nia opinio tiu decido estas intenca, politika agado de lerneja direkcio kaj de la urbestraro de Bjalistoko, kies bedaŭrinda plano estas transdoni nian sidejon al privata, romkatolika lernejo.*

*Kune kun likvido de nia lernejo finiĝos la populariga agado pri la lingvo kaj esperantismo inter bjalistokanaj infanoj kaj junularo.*

*Ni petas ĉiujn geesperantistojn pri helpo kaj perado ĉe ĉiuj bjalistokaj, ŝtataj, urbaj kaj lokaj aŭtoritatoj, por ke Lernejo L.L. Zamenhof ne malaperu el la bjalistoka lerneja mapo. Ni anticipe ege dankas pro viaj helpo kaj subteno.*

*46 geinstruistoj de la Lernejo*

Kiuj deziras sendi retleteron, ĉi-sekve la retadresoj:
Urbestraro de Bjalistoko: city@cksr.ac.bialystok.pl
Urbestro S-ro Ryszard Tur: bpm@city.bialystok.pl
Bv. informi pri viaj leteroj: rete → spnr23@polbox.com
poŝte → S-ino Nina Pietuchowska - str. Piastovska 3/7
PL-15 207 Bjalistok - Pollando

# NOVA ZEO EN FRANCIO

Pasintmarte, dimanĉon la 14ªⁿ, estis inaŭgurita Placo Doktoro Zamenhof en la urbo ***Bar le Duc*** (Lorena provinco), en nordorienta Francio. Ĉeestis la ceremonion Louis Zaleski-Zamenhof, nepo de nia Majstro. Post tio oni honorkunvenis ĉe la sidejo de la Komerca Ĉambro.

Jen bona motivo por direkti entuziasman gratulmesaĝon al la urb-estraro kaj urbestro S-ro Bertrand Pancher jenadrese:

Mairie-service communication - BP 559
12, rue Lapique - FR-55000 Bar le Duc - Francio
tel: +33 3 29795600; fakso: +33 3 29795623

BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
Tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperanto@retecivica.trieste.it; nored.@iol.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349

# APRILO 1999

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Lundo | | 5 Paska Lundo / Qing Mingjie / Pesach | 12 | 19 | 26 Ashura |
| Mardo | | 6 Pesach | 13 | 20 | 27 |
| Merkredo | | 7 Pesach | 14 Sinhala Aurud (2543) | 21 | 28 |
| Ĵaŭdo | 1 Pesach | 8 Pesach | 15 | 22 | 29 |
| Vendredo | 2 Pesach | 9 | 16 | 23 | 30 |
| Sabato | 3 Pesach | 10 | 17 1$^{A}$ Muharram (Islama novjartago) (1420) | 24 | |
| Dimanĉo | 4 Pasko (Anglikana, Katolika, Evangelia) / Pesach | 11 Pasko (Kopta, Ortodoksa) | 18 | 25 Festo de Liberiĝo | |


# APRILO 1999

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Lundo | | 5 Paska Lundo / Qing Mingjie / Pesach | 12 | 19 | 26 Ashura |
| Mardo | | 6 Pesach | 13 | 20 | 27 |
| Merkredo | | 7 Pesach | 14 Sinhala Aurud (2543) | 21 | 28 |
| Ĵaŭdo | 1 Pesach | 8 Pesach | 15 | 22 | 29 |
| Vendredo | 2 Pesach | 9 | 16 | 23 | 30 |
| Sabato | 3 Pesach | 10 | 17 1$^{A}$ Muharram (Islama novjartago) (1420) | 24 | |
| Dimanĉo | 4 Pasko (Anglikana, Katolika, Evangelia) / Pesach | 11 Pasko (Kopta, Ortodoksa) | 18 | 25 Festo de Liberiĝo | |

**5759 HEBREA JARO**

**1-8 - PESACH.**
Dum ĉi tiu semajno oni rememoras pri la liberiĝo de la hebrea popolo el la Egipta sklaveco. En familio oni festas manĝante tradiciajn bongustaĵojn, inter kiuj maldolĉajn herbojn kaj macon (sengistan panon).

**2559 BUDHISTA JARO**

**5 - QING MINGJE** (Ĉinio).
Temas pri la tago de pureco kaj lumeco, memore al la forpasintoj. La familioj iras al tombejoj kaj prizorgas la tombojn, regalante la mortintojn per manĝaĵoj kaj trinkaĵoj kaj bruligante incensajn bastonetojn.

**14 - SINHALA AURUD (NOVJARTAGO EN SRILANKO) 2543.**
Tiutage oni celebras plurajn favorigajn ceremoniojn. Unu el tiuj estas la unktado de la kapo per oleo kaj aromaj herboj. La geinfanoj strikte devas observi serion da reguloj (*Litha*), sekve de kio ili bone kondutos dum la tuta nova jaro.

**2055 HINDUISMA JARO**

**1999 KRISTANA JARO**

**4 - PASKO (ANGLIKANA, EVANGELIA, KATOLIKA).**
Por la tri konfesioj ĝi estas la plej grava festo. Oni memoras pri la resurekto de Jesuo Kristo. Tradicie oni manĝas ŝafidon, kolomboforman kukon kaj ĉokoladajn ovojn.

**11 - KOPTA KAJ ORTODOKSA PASKO**

**1419/20 ISLAMA JARO**

**17 - 1A MUHARRAM (ISLAMA NOVJARTAGO) 1420.**
Oni rememoras pri la fuĝo de Profeto Mahometo (*Muhammad*) kaj ties sekvantaro el Mekko al Medino (Heĝiro - 622 j. p.K.): eko de nova erao kaj de nova kalendaro.

**26 - ASHURA.**
Ĝi memorigas pri la transpaso de la Ruĝa Maro flanke de Moseo kaj Izraelidoj. La Scitoj en tiu tago memorelvokas la martiriĝon de nepo de Mahometo.

---

**5 - PASKA LUNDO (ITALIO).**
Aldona paska festotago, duonreligia kaj duoncivila. Tiutage estas tradicio pikniki en la naturo per simplaj manĝoj, kiaj enŝele boligitaj ovoj kaj freŝaj salatoj.

**25 - FESTO DE LIBERIĜO (ITALIO).**
Oni rememoras pri la liberiĝo el la nazia okupado kaj finiĝo de la diktatora faŝisma reĝimo, en 1945.

**5759 HEBREA JARO**

**1-8 - PESACH.**
Dum ĉi tiu semajno oni rememoras pri la liberiĝo de la hebrea popolo el la Egipta sklaveco. En familio oni festas manĝante tradiciajn bongustaĵojn, inter kiuj maldolĉajn herbojn kaj macon (sengistan panon).

**2559 BUDHISTA JARO**

**5 - QING MINGJE** (Ĉinio).
Temas pri la tago de pureco kaj lumeco, memore al la forpasintoj. La familioj iras al tombejoj kaj prizorgas la tombojn, regalante la mortintojn per manĝaĵoj kaj trinkaĵoj kaj bruligante incensajn bastonetojn.

**14 - SINHALA AURUD (NOVJARTAGO EN SRILANKO) 2543.**
Tiutage oni celebras plurajn favorigajn ceremoniojn. Unu el tiuj estas la unktado de la kapo per oleo kaj aromaj herboj. La geinfanoj strikte devas observi serion da reguloj (*Litha*), sekve de kio ili bone kondutos dum la tuta nova jaro.

**2055 HINDUISMA JARO**

**1999 KRISTANA JARO**

**4 - PASKO (ANGLIKANA, EVANGELIA, KATOLIKA).**
Por la tri konfesioj ĝi estas la plej grava festo. Oni memoras pri la resurekto de Jesuo Kristo. Tradicie oni manĝas ŝafidon, kolomboforman kukon kaj ĉokoladajn ovojn.

**11 - KOPTA KAJ ORTODOKSA PASKO**

**1419/20 ISLAMA JARO**

**17 - 1A MUHARRAM (ISLAMA NOVJARTAGO) 1420.**
Oni rememoras pri la fuĝo de Profeto *Muhammad* (Mahometo) kaj ties sekvantaro el Mekko al Medino (Heĝiro - 622 j. p.K.): eko de nova erao kaj de nova kalendaro.

**26 - ASHURA.**
Ĝi memorigas pri la transpaso de la Ruĝa Maro flanke de Moseo kaj Izraelidoj. La Scitoj en tiu tago memorelvokas la martiriĝon de nepo de Mahometo.

---

**5 - PASKA LUNDO (ITALIO).**
Aldona paska festotago, duonreligia kaj duoncivila. Tiutage estas tradicio pikniki en la naturo per simplaj manĝoj, kiaj enŝele boligitaj ovoj kaj freŝaj salatoj.

**25 - FESTO DE LIBERIĜO (ITALIO).**
Oni rememoras pri la liberiĝo el la nazia okupado kaj finiĝo de la diktatora faŝisma reĝimo, en 1945.